

ju 10

ju 15

M 9 ✓

BULGARA ESPERANTISTO

Organo de Bulgara Esperantista Asocio

Jarabono: 20 bulgaraj levoj, 1 svisa franko, 4 respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Adreso: SOFIA, poŝtkesto 233

JARO XV

Novembro - Decembro

Nº 3-4



Atanas Mihov

Renkonto

Feliĉan Novjaron!

Ankoraŭ unu jaro jam falis en la abismon de la eterneco.

En la komenco de la nova jaro ĉiu vera esperantisto devas fari sian bilancon: ĉu li dum la pasinta jaro plenumis siajn devojn kiel esperantisto, ĉu li vere donis siajn moralajn kaj materialajn fortojn por la prospero de nia ideo, aŭ li nur portas la nomon „esperantisto“, estante sub la ombro de la inerteco, de la pasiveco. Ĉar esperantistoj povas ekzisti, sed la movado bezonas aktivajn pionirojn.

Ni neniam forgesu, ke la nova jaro por nia movado estos tia, kian ni, per niaj klopodoj, fortoj, per nia aktiveco faros ĝin. Jes — la Espero estas nia standardo. Sed en la fundo de tiu nia espero estas: laboro, ago. Dum la nova jaro ni duobligu niajn fortojn, ni plifortigu nian organizan vivon. Per tio ni gajnos la necesan pli grandan signifon en la socio.

Esperantistoj el ĉiuj punktoj de nia lando — ne malesperiĝu. Ne permesu, ke la ekzistanta tutmonda krizo tuŝu vian esperon. Fiere ni levu la kapon. En la batalo ni nur hardas nian kredon, niajn fortojn, nian verdan animon.

Plenigu ni la pokalojn per la plej bona vino de nia espero, forpuŝu ni la malesperojn kaj ni trinku! Ni trinku por la grandega kaj eterna nia ideo, por nia kredo kaj direktu niajn rigardojn al la proksima estonteco, kiam la radioj de nia verda stelo venkos la mallumon. Tiam alvenos ankaŭ la kara nova jaro ne nur por la esperantistoj, sed por la tuta mondo.

Esperante ni renkontu ankaŭ tiun jaron!
Feliĉan Novjaron!

St. Radev

Nova jaro

MALNOVA POEMO POR LA NOVA
JARO

De D-ro Leono Zamenhof.

Novan turnon ĵus finis la tempo,
Freŝan paĝon komencas homaro,
Fermis pardon la vivo pasinta,
Nin alvokas al ag' nova jaro.

Ĉu, pesante la lastan rikolton,
Per malĝoj' ni plenigas la koron,
Ke ne dece ni portis standardon,
En batal' al ni mankis fervoro?

Aŭ fiere ni levos la frunton,
Rigardante la fruktojn kun ĝojo,
En la koroj sentante la flamon
Kaj la forton, ne fali sur vojo?

Gaje sonas responde tintiloj
Bruas venke standard' kun fiero,
Super ni ĉiam lumas la stelo
Klara, brila: la stel' de l' espero.

Ĝoje festas amika tendaro
Jaron venkan post pena laboro
Kaj al nova pretiĝas nun vojo
Por daŭrigi batalon kun gloro

Nova jaro malfermu do pardon,
Al ni vojon ne baru al celo,
Ne timigos nin tondroj, ventegoj,
Ĉar espera kondukas nin stelo!

„По въпроса за езика есперанто, азъ мисля, че той е най-хубавата възможностъ за малки народи като нашия, да популяризиратъ своитѣ духовни ценности, при липса на интересъ къмъ матерния имъ езикъ отъ страна на другитѣ народи“.

Владимиръ Поляновъ

C. Komitato de Bulgara Esperantista Asocio sendas al ĉiuj esperantistoj siajn novjarajn bondezirojn. Tiu jaro alportu al ĉiu personon feliĉon kaj al la movado en nia lando pli grandajn sukcesojn.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ bondeziras al ĉiuj siaj en- kaj eksterlandaj legantoj feliĉan Novjaron. Ni ne forgesu, ke la vivo kaj sukceso de nia revuo kuŝas en la manoj de la esperantistoj.

Vintra skizo

(Versaĵo en prozo de N. M. Kocev)

Belega vintra vespero! Malrapide kiel blankaj papiletoj falas la neĝeroj, kovras la teron kaj ornamas la arbojn. La vetero estas kvieta, la aero — freŝa. Revante mi marŝas sola sur la lumigita de la elektrolampoj ĝardena aleo, ĝuante la belan vesperon kaj la blankajn neĝerojn, kiuj kvazaŭ kun tremo, kiel brilantaj okuletoj, aperas antaŭ la lampoj kaj flegme falas malsupren. La ĝardeno estas bela kaj ĝi plenumas la koron per apartaj sentoj; ĝia aspekto dum tia bela blanka nokto levas la bruston, nevole la penso ekflugas tiun, kiun la koro sopiras.

Turmento pri ŝi, pri tiu, kiun tiel pasie mi amas, aperis en tuta mia estaĵo kaj kvazaŭ lacigita pro io mi sidas sur la unuan benkon kaj malfacila sopiro eliĝas el mia brusto. La etaj neĝeroj daŭras flugi, tiklas mian vizaĝon kaj falas kvazaŭ ankaŭ lacigitaj pro la daŭra ludo. Kun direktita ien, en la spacon, rigardo kaj apoganta sur la benko mi ekrevadis... Ho, jes mi ŝatas ŝin, mi amas ŝin, kaj ĉion mi jam al ŝi konfesis. Kiel milda estas! Kiel bela kaj bona! Mi volas nesatigeble premi ŝin sur mian bruston, karesi ŝin, kisi ŝiajn lipojn kaj konstante ripeti al ŝi: „mi amas vin, anĝelo mia, mi ŝatas vin!“

Kaj la neĝeroj sin puŝas unu la alian, paroletas ion kaj kun kompatanda rigardo kvazaŭ alrigardas min kaj diras: „Ne ĉagrenu, juna homo, ne ĉagrenu! Ŝi estos via, ĉar la pura amo ĉiam triumfas kaj ĝi estas nevenkebla“ — kaj daŭras malrapide kiel etaj blankaj papilioj kovri la teron kaj ornami la senfoliajn jam arbojn.

Belega vintra vespero, kiu plenigas la koron per dolĉa turmento!

Granda perdo

Kun granda doloro ni sciigas al ĉiuj, ke en la tagoj, kiam ni festis la 74-an datrevenon de la naskiĝtago de nia majstro, mortis la simpatia majstro-frato

D-ro Felikso Zamenhof

La bulgaraj esperantistoj ankaŭ funebras pro la granda perdo. Bulgara Esperantista Asocio esprimas al la familio Zamenhof siajn profundajn kondolencojn.

„Есперанто е едно отъ оржията въ ржцетъ на интернационалиститъ. Трѣбва, обаче, веднага да се прибави — едно оржжие съ две остриета. Защото, колкото на гледъ и да е лекъ пжтя за интернационализиране на човѣчеството чрезъ есперанто, толкова той е и труденъ, като се вземе предвидъ изключителното обаяние отъ майчиния езикъ, което всѣки носи въ себе си“.

Н. Т. Фоль

Asen Zlatarov

El la poemo „Kanto por ŝi“Bethsabél, Betshabél... Es-tu la femme?
Es-tu la source?

André Gide

Longa estas la vojo, kiun mi trairis post Vi, kaj la fino ankoraŭ ne estas videbla! Mia koro ne trankviliĝis pro soifo je via ĉarmo, kiu ekbrulis por mi en la tago, kiam mi malfermis la okulojn al la ĉielo, kaj Vi ĉiam estas tiel malproksima, kiel en la momento, kiam Vi aperis en miaj songoj kiel luma antaŭsento! En mia animo eĥiĝas Via nomo, kiun miaj lipoj apenaŭ mallaute kuraĝas eldiri!

Vizio! Vizio!

Sur multaj krucvojoj haltas mia paŝo, sed Vi sufloris al mi la vojon, kiu kondukas al Vi kaj mi ekpaŝis tien, kien min allogis Via spiro!

Kruta vojo, kiu elĉerpas la fortojn de la koro kaj sur kies akraj ŝtonoj mi lasis postsingnojn de la sango de mia animo...

Vizio! Vizio!

El la poemaro „Floroj por li“A sensitive plant
in a garden grew

Shelley

Tiel.

Kviete kuŝigu la kapon sur mian bruston kaj ripozu, ripozu pace lacekonsumenta, ripozu senribele, trankviliĝinta sur la arĝentaj ondoj de mia serena animo.

Malaperu la fantomoj de bolanta pasio kaj permesu, ke mi travivu momentojn de pura ĝuego kaj ĝojo ĉe la ektuŝo de Via animo!

Mia koro estas lunradio, en kies opala tremo brilas la figuro de la frua kvieta amo, al kiu transportiĝis la ekstazo de mia juneco.

Tiel.

Ripozu kviete kaj pace — kaj la tempo forgesu nin, ĝi forflugu al la aliaj, al tiuj, kiuj atendas kaj ĝi portu al ili forgeson, kiun ili sopiras.

Ni havas momentojn tra kiuj briletas la eterneco kaj la senfineco de l'ĝuego.

Paco malkovriĝas en mia animo, luma kaj pura — kien min portas la blankaj flugiloj de la reviviĝinta senkulpo. Mian bruston plenigas la freŝa senfino de novaj ĉieloj kaj miaj okuloj dronas en viglo kaj lazuro.

Songo.

Fabelo.

Ĝuego.

Daŭru senfine tiu flugo de pura animo, kie mankas soifo kaj vekiĝinta karno.

Kun aŭtorpermeso: *Iv. H. Krestanov*

„Първият чуждъ езикъ, който бѣхъ научилъ следъ руския, бѣше есперанто. Обичамъ да чета на есперанто и особено оригинални работи, писани на тоя езикъ. По характеръ той ми напомня романскитѣ езици. Той престава да бжде *изкуственъ* езикъ, защото хората пишатъ и говорятъ на него, чувствуваатъ го и по тоя чачинъ му вдѣхватъ душа. Голѣмата лекота и безкрайната възможность на изразяване го правятъ най-модерно езиково сръдство за международни свръзки. Вънъ отъ практическата полза той постига и висша хуманитарна цель — обединява хората въ едно всемирно братство“.

Емануилъ п. Димитровъ

Baj Ganjo Balkanski

KLARIGA NOTO: Tre karaktera aparteco de l' krea proceso ĉe Aleko Konstantinov estas la koncentrigo en unu persono de ecoj, observataj ĉe plej diversaj okazoj. Tiel estiĝis lia plej populara verko, la senmorta „Baj Ganjo Balkanski“ — humora rakontaro ilustranta la morojn, karakteron, vivon, komprenojn kaj celadojn de la metita en ĝia centro maldelikata, needukita bulgaro. En la tuta verko, prezentanta apartajn rakontojn (Baj Ganjo vojaĝas, B. G. en la opero, B. G. en la banejo, B. G. en Dresdeno, B. G. ĉe la ekspozicio en Praha, B. G. ĉe Ireĉek, B. G. gastas, ktp.) kaj tradukita en esp., ni donas tie ĉi la sekvantan plej mallongan, kiu sufiĉe konigas la spiriton de tiu verko.

I. H. K.

Baj Ganjo en la opero

Mi konsentigis Baj Ganjon, ke ni promenu ĝis la operejo kaj aĉetu al ni biletojn por la vespero. Estis prezentota la baleto „Puppenfee“, kaj mi ne scias ankoraŭ kio. Ni preterpasis la Grekan Kafejon, turnis al la kafejo Mendl, kie sin kolektas la bulgaroj, kaj nin direktas al la preĝejo Sankta Stéfano. Tie ĉi sur la placo mi invitis Baj Ganjon deiri en la dolĉaĵojn, ne supozante, ke la karaktero de Don-Juan povas sin kaŝi sub la haŭto de Baj Ganjo. Sed kiajn miraklojn ne faras la civilizo! Mi devas diri al vi, ke mi studis tiam en Vieno; mi estis forveturinta pro la libertempo kaj nun revenante, survoje al Vieno mi konatiĝis kun Baj Ganjo. En tiun dolĉejon mi iris ofte, kaj mi estis tre bona konato al la kasiŝtino, beleta kaj gaja knabino, gaja, sed ŝi tenis sin bone kaj ne permesis liberaĵojn. Kaj prezentu al vi, sinjoroj, mi eniras kun Baj Ganjo en la dolĉejon, proksimiĝas al la bufedo, la knabino min salutas gaje kun „bone veninta“, mi respondas per kelkaj ŝercaj afablaĵoj kaj revenas por elekti ion dolĉan, kaj en tiu ĉi tempo iu indigna krio eksonis tra la tuta ejo...

— Kio okazis, Baj Ganjo, ĉu ci faris al ŝi ion? — mi elkriis konfuzite kaj kolere.

— Mi do nenion, fraĉjo, kion mi ja povus fari al ŝi? — respondis embarasite Baj Ganjo, kun tremanta voĉo.

La knabino, kolerigita ĝis alta grado, kun flamanta vizaĝo, per laŭta voĉo rakontis al mi, ke Baj Ganjo ŝin ofendis per ago, li estis tuŝinta ŝin kaj ne nur tion ĉi, sed li provis ankaŭ la manon ĉirkaŭ ŝi volvi kun premitaj dentoj. Ŝi volis voki policanon. Skandalo!

— Foriru tuj de ĉi tie, Baj Ganjo; se cin trovas la policano, ia afero estos malbona, kuru do antaŭe, mi cin atingos — elkriis mi kun ŝajna indigno, kaj mal multe restis por ridi, rigardante la tragikomedian figuron de Baj Ganjo.

— Kian ŝajnpozon ŝi prenas! diris kuraĝe Baj Ganjo elirante, kvazaŭ ŝi estas honesta. Mi konas la ĉi tieajn virinojn. Montru al ŝi la monujon — tuj Gut Morgen, sed Baj Ganjo ne estas simpla!...

Estis destinite al mi, fini la impresojn de tiu ĉi tago kun ankoraŭ unu aventuro, kies heroo estis ree nia Baj Ganjo. En la operejo oni donis, kiel mi diris al vi, la baleton Puppenfee. Ni okupis sidlokojn en la parteroj. La teatro estis plena. La ruĝbrunaj vestoj de Baj Ganjo frapis la okulojn kiel kontrasto al la komuna malhela fono de la kostumoj. La kurteno leviĝis. Morta silento ekregas. Ĉiuj direktis la okulojn al la fantazie dekorita scenejo. Mi sentis, ke ĉe mia dekstra flanko Baj Ganjo iom movetiĝas, ĝemas, sed mi ne povas fortiri miajn okulojn de la scenejo: la figuroj de l' baleto konstante variis, kvazaŭ laŭ la movo de sorĉista bastono, diversaj grupoj de la baletdancistinoj aperas, malaperas; sur

la scenejo jen mallumo, jen unukolora, jen diverskolora lumo — feaĵo! El la komuna grupo de la dancistinoj unu disiĝas, venas per malgrandaj, rapidaj paŝoj al la antaŭscenejo, haltas, saltas supren kaj ekaĝas en la aero, subtenata nur sur la pinteto de unu el siaj piedoj... Custe en tiu ĉi sama momento post mia dorso ia histeria ha-ha-ha-ha! fendis la aeron. Mi turnas min maldekstren — ĉiuj viroj post mi ridegas kaj montras ion ĉe mia dekstra flanko. Momente trapasis mian kapon io nebona. Mi turnas min al Baj Ganjo... Dio! Kion mi vidas! Baj Ganjo sidis malvestiĝinta en ĉemizmanikoj kaj malbutonuminta sian veŝton, kiu lin premas pro la ŝtopitaj en lia zono boteletoj da rozoleo: iu el la teatroservistoj estis lin kaptinta per du fingroj ĉe la maniko kaj faras al li per la kapo tute nedusencajn signojn, ke li eliru iom eksteren; Baj Ganjo lin rigardas grandokule kaj respondas al li same per signoj „Kio do, kiun vi kredas timigi?“ Nome tiu ĉi vira konduto kaŭzis la histerian ridon ĉe iu knabineto, kiu sidis malantaŭ ni, kaj tiu ĉi rido infektis la tutan teatron. Bildo... Kaj prezenetu al vi, sinjoroj, mi ekrigardas al la loĝioj, kvazaŭ iu min tiris ekrigardi tien, kaj miaj okuloj renkontiĝas — mi volus malapeŝi pro honto — kun la fiksitaj sur min okuloj de konata al mi germana familio, ĉe kiu mi estis tre bone akceptata, kaj en iliaj okuloj mi tra legis sinceran kompaton pri mia bedaŭrinda situacio. Kaj en tiu malespera momento, Baj Ganjo min tiris energie ĉe la maniko:

— Nu antaŭen, ni eliru, lasu tiujn friponojn, — ili falos iufoje en miajn manojn, atendu nur!...

Esp. Iv. H. Krestanov

Impresoj de XX-a jubilea kongreso en Russe (Ruschuko)

(daŭrigo)

Deknaŭa de Julio. Proksimiĝas la dekunua horo kaj ni jam preparas niajn pakajojn kaj senpacience atendas la boaton, kiu transportos nin sur la rumanan teron. Jen ĝi venas. Pli ol 35 geesperantistoj jam eniris la boaton. Ĝi ekveturas. Ni ekkantas amase la himnon kaj flirtigas la standardojn.

La momento estas superbela. Hazarde la boato iomdefektiĝas kaj okazas malgranda malagrablaĵo, sed post kelkaj minutoj ĉio estas en ordo kaj ni denove daŭrigas nian vojon. Ni jam estas sur la rumana tero — Ĝiurĝiu. Ĉi-tie, vere, oni povas eksenti kian grandan valoron havas esperanto. Post duhora promenado tra la urbo Ĝiurĝiu, ni envagoniĝas kaj ekveturas al Bukaresto.

Parolante, kantante kaj ludante, ni ne rimarkas kiam la vagonaro alvenis sur la perono de la stacidomo Filaret. Nin atendas la rumanaj gesamideanoj — sufiĉe multnombraj malgraŭ la pluvego.

Inter la geesperantistoj videbla estas la figuro de la Bukaresta urbestro — sinjoro Angelesku. Li frate kaj varmege

salutas nin. Post lia frata kaj varma saluto nia tre ŝatata kaj laborema s-no kapitano Radev respondas al la urbestro kaj salutas la rumanojn per la samaj belaj vortoj je sia nomo kaj je la nomo de la tuta geesperantistaro en Bulgarujo.

Post tiuj solenaj momentoj ni ekmarŝas al la komuna loĝejo.

Je la deka horo okazas interkonatiĝa vespero. Ĉi-tie oni ankaŭ interŝanĝas salutojn kaj bondezirojn pri la fratiĝo kaj amikiĝo de tiuj du najbaraj popoloj — bulgara kaj rumana.

Sekvantan tagon niaj rumanaj amikoj aranĝas belegan ekskurson per aŭtobusoj, per rimedoj de la komunumo, dank' al la simpatia kaj laborema urbestro s-ro Angelesku, kiu estas bonega amiko de nia movado.

La ekskurso okazas ĝis unu el la plej belaj kaj ĉarmaj ĉirkaŭaĵoj de Bukaresto — SNAGOV. Ĝi situas 35 — 40 kilom. malproksime de la ĉefurbo. La vojo ĝis tie estas kvazaŭ plato.

Nin akompanas la urbestro, la direktoro de la komerca ĉambro s-ro Popo-

viĉ, nia fama samideano s-ro Fiŝer, la senatoro s-ro Cimiraŝ kaj multaj famaj kaj eminentaj rumanaj viroj kaj bukarrestaj geesperantistoj. Tie okazas bonega komuna tagmanĝo. Ĝi estis aranĝita sub la protekto kaj iniciato de la ĉefa urbestro — s-ro Dobresku. Sekvas kelkaj salutparoladoj flanke de la bulgaroj kaj rumanoj. La urbestro per belega kaj elokventa parolado pripentras la situacion de tiuj du popoloj, trovante ke tiuj popoloj havas unu kaj saman historion kaj interalie li substrekas, ke la rumanoj neniam ĉesos batali por la fratiĝo kaj amikiĝo de bulgara kaj rumana popoloj.

Poste prenas la parolon nia ŝatata kaj laborema karavanestro s-ro kap. Radev. Li parolas en la sama senco. Post tiuj salutparoladoj kaj belega tagmanĝo oni aranĝas ekskurson per boatoj sur la belega kaj sufiĉe granda lago, kiu troviĝas en Snagov. La boatoj estas sufiĉe grandaj, ĉar sur iliaj plafonoj okazas dancoj, ludoj k. a. Oni apenaŭ povas esprimi kaj prikskribi la belan aspekton de tiu ĉirkaŭaĵo! Snagov! Memorinda kaj neforgebla! Vi estas ĉarmigita de la vido de tiu beleco! ...

La sekvintan tagon ĉiuj bulgaroj, akompanataj de rumanaj gesamideanoj, vizitas preskaŭ ĉiujn vidindaĵojn. Ni estis invitataj viziti la komercan ĉambron, kion ni faras posttagmeze. Tie ni ankaŭ estis gastigitaj de l' komerca ĉambro. Okazis salutparoloj: parolis la direktoro de l' komerca ĉambro, la redaktoro de „Ve-

getarano“ s-ro Jonesku, s-ro Fiŝer kaj nia karavanestro kapit. Radev. Je la kvara horo ni, la bulgaroj, amase vizitas la faman militrezistantan verkiston sinjoro Relĝis. Mi salutis lin je la nomo de la bulgaraj militrezistantoj kaj interalie substrekis, ke la bulgaroj laboras kaj dissemas la semojn de l' amo — amo eterna kaj vera, amo dezirata de ĉiu esperantista koro! Li same salutas nin kaj parolis pri sia senlaca klopodo forigi por eterne la militon de la homaro kaj efektiviĝi amon kaj pacon inter la homoj-fratoj.

Je la 11-a horo de la sekvanta tago ni jam estas en la stacidomo, kie nin atendas grandnombre rumanaj geesperantistoj. La vagonaro estas preta ekveturi. Ni envagoniĝas. Nur salutbondeziroj estis aŭdataj. La momento estas belega kaj neforgebla. Ni nun ĉiuj bone eksentas la valoron de nia kara lingvo esperanto. La vagonaro ekveturas, ni ekkantas la himnon. Longtempe ankoraŭ aŭdiĝas la adiaŭkrioj.

Je la 17-a horo ni atingis Rusĉukon. Do, tiel finiĝis la bele aranĝita postkongresa ekskurso al Bukaresto, Snagov kaj returne. Por la ekskurso oni devas danki al la Rusĉuka esp. societo kaj precipe al nia tre sperta en la eksterlandaj ekskursoj samideano kapit. Radev, dank' al kiu ni estas vidintaj Prahon, Vienon, Budapeŝton, Bukareston kaj eble ni vidos Stokholmon — li estu salutata!

Iv. Iliev

En la tago de la libro

(pensoj)

Ni sentas ĉiuminute bezonon de fidela kaj saĝa amiko. Tia amiko de ĉiu estas la libro.

Kiam ajn ni turnus nin al ĝi, ni trovos ĝin preta nin helpi.

*

Popolo sen libro estas tago sen suno.

*

La bona libro estas kiel bona patrino — ĝi estas amo, ĝojo kaj revo.

*

Amu kaj gardu la libron!

La plej maturaj fruktoj de la kulturo estas fermitaj en la modestaj, palaj paĝoj de la libro.

*

Estontaj generacioj! Vi venkos per la libro!


*

La libro estas la plej bona donaco.

*

Libro fundon ne havas.

Kolektis kaj esp.: I. H. K.



Atanas Miĥov


Fabelo pri la „Supra Tero“

Bulgarujo estas turista lando par excellence. Tion konstatas ankaŭ ĉiuj fremduloj, kiuj ĝin vizitas. Belegaj pejzaĝoj ĉarmas la okulojn ĉiuflanke. Montoj, valoj, riveroj, ĉio pentrinda, prikantinda... Prave oni komparas ĝin al „Svislando“, nomante ĝin la „Balkana Svisujo“. Kaj ĝia belega naturo inspiris ne nur unu pentriston. Multaj jam ekspozicias siajn pentraĵojn en la ĉefurbo Sofia, junaj kaj maljunaj. Sed inter ĉiuj la nomo de Atanas Miĥov okupas vidindan lokon. Jam 30 jarojn li pentras kaj ekspozicias mirindajn pejzaĝojn. Liaj bildoj ĉiam diferenciĝas per simpleco kaj sincereco, delikata koloro, lerta tekniko.

Atanas Miĥov estas disĉiplo de la granda artisto Veŝin, sed li liberiĝis de la influo de sia profesoro kaj kreis sian propran stilon, sian skolon artistan. Riĉe inspirita de la bulgara naturo, la majstro Miĥov trovas ĉie en ĝia sino la ĉarmon kaj belecon, kaptante kaj transdonante konsciencie la forton kaj la majeston kaŝitajn en niaj gigantaj Rila kaj Vitoŝa montaroj.

Tre agema li estas, tre produktema, kaj jam multaj el liaj majstraj pentraĵoj ornamas niajn muzeojn, ŝtatsalonojn, la Sofian kaj eĉ fremdlandajn reĝpalacojn.

I. H. K.



Ĥristo Jonĉev Kriskarec

La pinto „Kupenite“ en Rilz-montaro

Esperantaj vortludoj

Jes, en Esp. oni povas fari
eĉ vortludojn.

„En tiu ĉi angulo ĉiu frato gajulo
rajtas sidi kaj ridi“.

ĈU VI SCIAS, KE :

0. La mondo estas er-aro.
1. La horo loĝas en la horloĝejo.
2. kelkaj katoj, kunvenante, fariĝas kataro.
3. se via kolo estus pli dika, pli granda, tio estus kolego; ero de ĝi estus kolero.
4. komo negranda povas esti kometo.
5. la katoj estas frandemaj pri la kolo de la musoj; do ili tre ŝatas la muskolon.
6. negranda ripo estas ripeto, kaj ĉiuj ripoj estas riparo.
7. du komoj kune povas esti komparo.
8. kiam aktoro havas rolon, kiu konsistas nur por peti, li havas petrolon.
9. iuj homoj ŝatas gazon, sed aliaj preferas gazeton.
10. kiam kato blekas sur tegmento estas katastrofo. Se iam vi verkus odon pri bestoj, la strofo rilatanta katon, estus katastrofo.
11. korvo estas birdo, kaj negranda korvo estas korveto. Same veto el koro.
12. kiam vi faras almozon per oro, tio estas ordono.
13. multaj bazoj povas formi bazaron.
14. vi povus posedi ingon por haroj, sed ne kuirigu tiun haringon.
15. se vi dispecigos vian liton kaj prenus eron el la pecoj, vi havos literon.
16. kiam la papo estos mortinta, se oni distranĉus lian korpon en multaj pecoj, kaj se oni prenus unu el ili, tiam oni havus paperon; tamen ne prenu ĉiujn erojn, vi havus paperaron. La ago de la papo estas papago, kaj la avo de la papo estas papavo.
17. kiam iu rabas alian personon, tiu lasta estas rabato. Iu rabota morgaŭ estas rabotaĵo.

18. persono, kiu naskiĝis dum la 8-a, kiu ankaŭ gajnas per 8, kiu vizitis la okan kongreson k.t.p., ĉu ĝi ne estas okulo.
19. kiuj ŝatas la devenejojn de akvo, estas fontanoj.
20. la senharuloj estis malsaĝaj dum sia infaneco, tial ilia malfeliĉaĵo estas harpuno.
21. kiam valora dento estas vendata, estas akcidento.
22. dum la esperantistaj kongresoj oni multe amuziĝas kaj am-uzas, sed la uzo de tiu amo ne ĉiam estas val-ora.
23. ne ĉiu homo portanta bastonon havas basan tonon, kiel ne ĉiu posedanta balkonon havas konon pri balo.
24. ono de bombo estas bombo no.
25. ne ĉiu barbaro portas barbon.
26. en nia balkano ne kreskas kanoj.
27. la cimballo ne estas agrabla balo.
28. ambiciulo havas sinamon, sed ne cinamon.
29. la nutraĵo de la antilopo ne estas ĉampano.
30. ne ĉiu di-amanto estas diamanto.
31. ĉiu disciplo devas obei disciplinon.
32. dieto ne estas malgranda Dio, ĉar Dio estas nur granda.
33. direktoro ofte ne posedas oron, prokuroro ne ĉiam ricevas oron por sia laboro.
34. diakono havas nepre multan konon pri Dio.
35. multaj eroj faras eraron.
36. ekzemplero estas erigata ekzemplo.
37. persono, kiu gratas, estas gratulo; tiajn oni ofte sendas en sen-dataj leteroj.
38. konkurso havas ankaŭ du signifojn.
39. eĉ homoj kun malneta koro povas ludi korneton.
40. kataro kaj katarakto ne estas nur malsanoj, vidu pri tio katalogon.
41. se kano lasas tonon, vi havos kantonon.
42. oro ĉirkaŭ la kolo estas koloro.
43. peco de dispecigita kulo estas kulero, de dispecigita kolo — kolero aŭ kolono.
44. kamparanoj kaj vegetaranoj ne estas bestoj.
45. kalkulo povas esti farata ankaŭ sen kalko.
46. ofte ni similigas infanon al ido de la koro kaj al oro, do oni havas koridoron.
47. ne ĉiu, kiu tentas per kono, estas kontenta
48. en la nunaj tempoj la pago de luo estas lupago.
49. la esperanta ovo krakis en Krakovo.
50. kio estas kuraĝo? Kazino? Kajero? Koketi? Kompreno?

(daŭrigota)

Iv. H. Krestanov

Radio-paroladoj el Wien

17. jan.: Reg. kons. Hugo Steiner: Vintroplezuroj en Niderösterreich (disp de fremdulfrakvent-komisiono de N. Oest.)
24. jan.: D-ro inĝ. Eugen Wüster: La elektroprovizado de Aŭstrio.
31. jan.: Emma Raff: Belaj artoj en Aŭstrio (Radio-parolado de ministro por instruado d-ro Kurt Schuschnigg, kun ties permeso).
7. februaro: Kalkul. konsil. Rudolf Michael Fray: Karnavalaj kutimoj en Vien (Dispon. de „Altwisnerbund“).
14. febr.: Reg. kons. Hugo Steiner: Foiro de Wien (Disp. de „Foiro de Wien“).

El la vivo de C. K.

Dum la XX kongreso en Ruse oni atentigis, ke la kunligo inter la centro kaj la provincaj societoj estas malforta kaj pro tio ankaŭ la poresperanta movado malfortiĝas. Konsiderinte la ĉi-supran opinion, la CK de BEA ŝarĝis la sekretarionkasiston de BEA viziti la societojn, renkontiĝi kun la estraroj de l' societoj, konatiĝi persone kun iliaj societanoj mem kaj fari publikajn paroladojn pri Esperanto ĉie, kie la lokaj cirkonstancoj estas favoraj. Por plenumi tiun-ĉi taskon la sekretario de BEA S-ro P. Mitkov, la 5-an de Decembro 1933, ĉeestis la malfermon de esp. kurso por la urbanoj en T. Pazarĝik, kie li parolis pri organizaj demandoj kaj abonigis je „Bulgara Esperantisto“. La 7-an de Decembro li estis jam en Plovdiv, kie li vizitis la societan estraron. Oni interŝanĝis pensojn koncerne la agadmanieron de la societo, kies aktiveco nun estas tre malforta.

La 8-an de la sama monato la sekretario ĝenerala de BEA alvenis en Burgas, kie li havis renkonton kun la prezidanto de la loka esp. societo. La lasta komunikis al li, ke baldaŭ okazos la jara kunveno de l' membroj por elekto de nova estraro. En Burgas S-ro Kirjak Konstantinov gvidas esp. kurson por la urbanoj en la klubejo de l' esperanta societo.

La 10-an de Decembro S-ro Mitkov estis en Jambol, kie okazis la jara kunveno de la tiea societo. En Jambol li parolis al la samideanoj pri organizaj demandoj. La vesperon li faris paroladon en la ĉambrego de la legejo antaŭ la urbanoj, kiuj amase vizitis la kunvenon. Post la parolado arĥitekto Kurtev legis provan lecionon en Esperanto. En la urbo estas malfermitaj du kursoj bone funkciantaj, vizitataj de 75 personoj.

La 22-an de Decembro la sekretario faris paroladon en la salono de la legejo en Gorna-Orehovica. La frostoj malhelpis la amasan viziton de l' parolado. Li renkontiĝis kun la esperantistoj-oficistoj en la stacidomo sufiĉe multenombraj. Ili esprimis deziron formi societon aparte de la societo en la urbo.

La 23-an de Decembro S-ro Mitkov estis jam en Ruse, kie li parolis kun la prezidanto de l' societo „Solidareco“ pri organizaj demandoj kaj kie li varbis novajn abonantojn por „Bulgara Esperantisto“.

La 24-an kaj 25-an de Decembro li estis en Varna, kie ĉeestis la jaran kunvenon de l' societo. Oni elektis novan estraron. Dum la pasinta jaro la societo agis nesufiĉe, sed la komitato por propagando de Esperanto — kiel estro estas S-ro Sapunĝiev — agis aktive. Ni esperas, ke dum la nuna jaro la societo aktiviĝos.

La 25-an de Decembro S-ro Mitkov vizitis la urbon Ŝumen, kie li renkontiĝis kun nia fervora samideano Il. Silvestriev, nun honora prezidanto de la Ŝumena esperanto societo. Prezidanto de l' esperanta societo en Ŝumen estas nun Boris Kazanliev, prefekto de la distrikto, fervora samideano, kies prezido estas honoro por nia movado. Ni esperas, ke dum la kuranta jaro la societo aktiviĝos.

La 30-an kaj 31-an S-ro Mitkov aperis kiel meteoro en okcidento en la urbo Vidin, kie li renkontiĝis kun nia ŝatinda samideano Vl. Lazarov, advokato. Li promesis kunhelpi la esperantan propagandon kaj la sindonajn samideanojn S-rojn D-ro Velkov kaj N. Hristev, laborantaj diligente en tiu-ĉi regiono por nia ideo.

La 31-an en urbo Lom la sekretario kun la samideanoj renkontis la Novan jaron. Je l' okazo oni estis aranĝintaj esperantan feston, kie li faris mallongan paroladon. Estis ankaŭ deklamoj, humoraĵoj kaj dancoj ĝis mateniĝo.

Ni esperas, ke post tiu-ĉi senpera kontakto de l' esperanta centro kun la societoj la vivo de la lastaj plifortiĝos kaj ni povas atendi grandan kongreson.

Pagu vian abonon, ĉar 5-an numeron ni sendos nur al pagintaj abonantoj!

LINGVA TRIBUNO

LA INTERLIGA STREKO

Kiam el du substantivoj oni faras unu solan, por formi unu pli klare difinitan ideon, ekzemple: akvobotelo el la vortoj akvo kaj botelo, oni devas skribi la novan ideon per unu sola vorto aŭ interligi la du partojn per streketo. La streketon oni uzas, kiam la vorto sen ĝi fariĝus tro longa kaj tiel neklara, kaj ankaŭ por eviti miskomprenojn: sendata letero estas letero, kiun oni sendas, kaj sen-data letero

estas letero, kiu ne portas daton.

Estas do necese, skibi ekzemple „Esperanto-Asocio“ kun interliga streketo. Sen ĝi la esprimo ne havus senco; ĉar du substantivoj starus kune sen prepozicio, kiu klarigas la rilatojn inter ili. Do, oni povas skribi Esperantokurso aŭ Esperanto-kurso aŭ kurso pri Esperanto.

O. Bünemann, LK.

Резолюция

на XX-ти конгресъ на Български Есперантски Съюзъ

17-20. VII. 1933

Русе

1. Да се направятъ постѣпки предъ г. Министра на Нар. Просв. за въвеждане, поне факултативно, Есперанто: а) въ проектиранитѣ съ новия законъ за народната просвѣта педагогически академии; б) въ последния класъ на основнитѣ училища.

2. Да се направятъ постѣпки предъ г. Министра на Търговията за широко приложение на Есперанто отъ бюрото при сѣщото министерство за пропагандиране българскитѣ курорти въ чужбина съ издаване проспекти и други на Есперанто.

3. Да се положатъ необходимитѣ усилия за подновяването и установяването на идеята за балканскитѣ конференции и за „Balkana Konkordo“.

4. Да се направятъ постѣпки за ставане Бълг. Еспер. Съюзъ юридическо лице.

Решени

на XX-ти конгресъ на Български Есперантски Съюзъ

17-20. VII. 1933

Русе

1. Да се издадатъ неизлѣзлитѣ три книжки на „В. Esp.“

2. Бившиятъ съюзенъ чиновникъ Дим. Ивановъ отъ Русе да изплати дълга си отъ 1054 лв.;

3. Приема се програмата на Ц. Ф. Е.;

4. Членскиятъ вносъ къмъ Съюза да е 40 лва: 20 лв. за чл. вноска и 20 лв. за списанието. Дружествата да абонираатъ поне половината отъ своитѣ членове. Дружествата сѣ задължени да изнесатъ вечеринки и забави, като 15 процента отъ чистия приходъ се изпрати въ Съюза;

5. Препорѣчва се на дружествата да уредятъ, споредъ мѣстнитѣ условия, „verda semajno“;

6. Идушиятъ конгресъ да стане въ гр. Орѣхово, като конгресътъ се уреди отъ мѣстното дружество.

7. Да се установятъ и поддържатъ постоянни връзки между Ц. К. и дружествата.

El la redakcio.

1. En la venonta numero de „B. Esp.“ detala artikolo-raporto pri XX-a nia kongreso en Rusĉuko kun kliŝoj.

2. Niaj konataj pioniroj estas petataj sendi al ni mallongajn biografiajn poetojn kun kliŝo por aperigi en „B. E.“ kaj tiamaniere konatigi ilin al la nova esperantista generacio.

3. Skribu mallonge, legeble kaj nur sur la unua flanko.

4. La centra komitato de la BEA en la kunsido de 1. XII. 1933 elektis redakcian komitaton de Bulgara Esperantisto. Membroj de la redakcia komitato estas: St. Radev, St. Minkov kaj P. Mitkov.

Премия за нашитѣ абонати

Всѣки нашѣ абонатѣ има право да получи по единѣ екземплярѣ отъ *Българската антология* (250 стр.) — отлична читанка на есперанто, съдържаща характеристични разкази и стихове на

40 български писатели и писателки съ тѣхнитѣ портрети, ако прати 50 лева (т. е. половината цена) на съставителя ѝ: Ив. X. Кръстановѣ, ул. 6 септемврий, 2 — София.

Есперантски новини

Излѣзе отъ печатѣ всесвѣтски известната Дантева „Божествена комедия“ — частъ I — Адъ въ римовани стихове на есп. — преводѣ на д-ръ Коломанѣ Калочай, 320 стр., цена 8.80 шв. фр., издание на „Literatura mondo“ въ Будапеща.

— Международниятѣ есперантски музей се помѣщава въ Виена, I, Neue Burg, Heldeplatz. Искайте безплатенѣ проспектѣ.

— Международниятѣ есперантски домѣ въ Aspremont, A. M. Nice, Франция, се обзавежда отъ добре известнитѣ на българскитѣ есперантисти г. и г-жа Йеландѣ. Илюстрованиятѣ проспектѣ и периодичнитѣ бюлетини се пращатѣ безплатно.

— Официални пощ. карти съ есперантски текстѣ е издала бразилската поща — 20 различни карти се пращатѣ срещу 5 международни пощ. купони отъ Бразилския есп. съюзѣ Avenue Marechal Floriano, 212, Rio de Janeiro, Бразилия.

— Лионскиятѣ международенѣ панаирѣ е издалѣ голѣми афиши и серия пощенски илюстр. карти съ есп. текстѣ. Пращатѣ се безплатно отъ:

s-ro Richard Levin, Propaganda Fa-kestro, Foire de Lyon, Rue Ménéstrier, Lyon, Франция.

Сега готви каталогѣ на есперанто. Нека отбелѣжимѣ, че и други моестрени панаири, като тоя въ Лайпцигѣ, сж въвели въ употреба международния езикѣ и, споредѣ отчетитѣ имѣ, го употребяватѣ съ голѣма полза.

— Японскиятѣ есперантски конгресѣ, станалѣ въ Киото презѣ ноемврий 1933 г., протестира противѣ употребата на нови — нежелждни думи отъ нѣкои „модерни“ есперантисти, най-вече поети. Ние се присъединяваме къмѣ тоя протестѣ и обръщаме внимание на нашитѣ съидейници да употребяватѣ само Заменхови думи и тия, одобрени отъ Есперантската Академия и Езиковия Комитетѣ въ тѣхнитѣ официални прибавки, които сж влѣзли и въ новото издание на Кръстановия речникѣ.

Въ Франция — къмѣ групата за защита на Есперанто въ камарата на депутатитѣ вече сж се присъединили 55 депутати отъ всички политически партии. Между тази група и делегация отъ французкото дружество за пропаганда на есперанто на 29. ноемврий 1933

год. се е състояла срѣща, където сж били разгледани много въпроси и най-главно – въвеждането на есперанто въ училищата

Презъ настоящата година ще се състои въ Виена и Будапеща официална конференция за въвеждане на есперанто въ училищата и търговията,

Управителът на Rembrandt-музей въ Амстердамъ на драго сърдце обяснява на посетителитѣ изложеното въ музея на есперанто.

Международниятъ Есперантски Домъ, Aspermont, Francujo, Alpes Mitimes, събира сведения за свадби на есперантисти. Изпращайте на горния адресъ сведения съ имената, датитѣ, запознаване, езикъ и пр.

Samideanoj, ĉu vi volas viziti malmultekoste la sanktajn lokojn? — Se jes, atentu: Tri tagoj al Jerusalemo vagonare kaj ŝipe, vizito de Jerusalemo, Betleheмо, Nazareto, Haifa, Tel-Aviv, Jaffa, Morta lago, ktp. entute dusemajna restado en Palestino kaj tri tagoj ree al Sofia, kostos en t'ia klaso nur 3000 leva, por komuna pasporto, vizoj, manĝado kaj loĝado dum la 20-taga ekskurso, entute 5,000 leva. La eksurso okazos en aprilo, por la paskaj festoj.

Dezirantoj sin anoncu tuj al

Iv. H. Krestanov kaj D-ro I. Olsvanger, ul. „6. Septemvri“, 2, Sofia

N. Povas partopreni ankaŭ samideanoj el la najbaraj landoj. Gastoj neesperantistoj estas ankaŭ bonvenintaj.

Pagu vian abonon, ĉar 5 numeron ni ne sendos al la nepagintaj abonantoj!

NIA VIVO

Sofia. Okaze de la „Tago de la libro“, festata ĉe ni ĉiujare en novembro, la ŝtata presejo disponigis senpage lokon por esperantaj libroj en sia ekspozicio; la ekspozicio daŭris unu semajnon. Aranĝinto S-ro Iv. H. Krestanov.

* En la vegetara restoracio „Zdrava Ĥrana“ S-ro Ivan Iliev gvidas esp. kurson, 15 p.

* En la vegetara restoracio „6. Septemvri“ Vegetara societo organizas esp. kurson. En unu el ties salonoj F-ino Marta Root paroladis pri sia vojaĝo tra la mondo, pentrante la esperantan movadon en tre rozaj koloroj.

* Nia konata samideano D-ro Immanuel Olsvanger el Palestino vizitis ree nian ĉefurbon kaj restis unu monaton.

* La societo elektis sian novan komitaton: Prezid. — St. Ganĉev; vicprez. — St. Jonĉev; sekret. — Belĉo Oktomvrijski; kasisto — Dim. Stojanov; bibliotekistino — Berta Marinova. Kontr. komisiono: prezid. Teod. Popov kaj memdroj Stojan Stajkov kaj P. Ĉoĉev.

* Dank' al la klopodoj de S-ro Krestanov, la Sofia moderna granda hotelo „Со-оп“, str. Rakovski 126, farigis Esperanta entrepreno. Specialaj prezoj por esperantistoj.

* Celante varbi novajn samideanojn Sofia esperanto-societo aranĝis dum 8-24 de Decembro Verdán semajnon. Je la 21. XII. en la malgranda salono de vegetara restoracio parolis la samideanoj S. Hesapĉiev kaj St. Jonĉev. Je la 24 de la sama monato okazis publika parolado en la aŭditorio 5 de „Svoboden universitet“, kiam parolis prezidanto de la BEA s-ro P. Jordanov kaj s-ro D-ro Zah. Zahariev. Dum la vespero de la sama tago en la salono de vegetara restoracio „Zdrava Ĥrana“ estis aranĝita intima vesperamuzo, kiu estis bonege vizitita kaj brile elportita.

Estas petataj ĉiuj sofiaj gesamideanoj sendi siajn adresojn al la sekretario de sofia societo — Belĉo Oktomvrijski, str. „Ĉerna voda“ 27, Sofia, VIII.

Ruse (Rusĉuk). Nia senlaca propagandisto S-ro Petro G. Pamporov faris sukcesajn paroladojn pri sia vojaĝo tra Eŭropo. La rezulto estas 2 kursoj en la lokaj knaba kaj knabina gimnazioj. La sama paroladis ĉe la turista, abstinenca kaj virina societoj, por kiuj li gvidas novan kurson.

La loka esperanto-societo „Solidareco“ havas tiun societatan komitaton: Iv. Kotov — prezidanto; Iv. Kovaĉev — vic-

prezidanto; Dim. Mihailov — sekretario; Radosl. Manĉev — kasisto; f-no Kraĉmarova — bibliotekistino kaj konsilantoj: Jos. Klajner kaj G. Zorov.

La komitato vigle laboras kaj per siaj agoj gajnas gravajn sukcesojn. Per la konduto kaj ago de la estinta kaj de la nuna komitato estas gajnita por nia ideo la socia opinio.

Ĉiuĵaŭde vespere oni kunvenas. La virinoj-membroj de la societo, krom tio, aparte havas siajn kunvenojn.

Oreĥovo. Ĉe la legejo „Nadeĵda“ nia

samideano Radoslav Triĉkov parolis je temo: „Per esperanto tra la mondo“ kaj je la fino de la parolado okazis esperanta provleciono kun la publiko mem. Ekfunkciis tri kursoj: porinfana — 77 personoj, gimnaziana kun 38 personoj kaj geurbana kun 40 personoj, gvidataj de R. Triĉkova laŭ la rekta parola metodo.

T. Pazarĝik. De la 5-a de Decembro estas malfermitaj du trimonataj esperanto-kursoj — por komencantoj kaj por progresintoj.

BIBLIOGRAFIO

El la kolekto Vazov — *Elektitaj prozaĵoj* (Bulgarino, la Apostolo en danĝero, La Stelo, Anĝelo, Kristnaska donaco, Pejzaĝo, Funebro, Servistino, Du pordoj, La estonta literatura rondo, En la ĝardeno de la muzoj, Paŭlo Fertigo, Ah, Excellence!, Ŝi elpetegis, Naum, Amika renkonto), aŭtorigita traduko de Iv. H. Krestanov. La kolekto aperos post nelonge en aparta libro.

„*Tutmondo Esperanta*“. La revuo taŭgas precipe kiel legaĵo por komencintoj, kiuj perfektigu sin en la lingvo. Tion ili povas fari per facila legaĵo, kiun ili trovos en nia revuo. Abonprezo antaŭpagota 0.40 germ. markojn plus 20¢, sendkosto. — Tutmondo-Eldonejo Friedrich Schloe, Karlsruhe a. Rh., Dammerstockstr. № 15, Germanlando.

Bonhumoro de Paul Hyssens, 173 paĝoj, prezo 3 belgojn (= 75 bulg. levojn). Jen nova libro, verkita unue en franca lingvo kaj poste tradukita de la aŭtoro mem, kio ofte jam okazas lastatempe. Estas ja konate, ke bonhumoro estas socia forto kaj ni tre rekomendas tiun belan verkon, kiu ĝojigas kaj sanigas per sia agrabla enhavo, forpuŝanta la nigrajn zorgojn de la nuna kriza tempo. Havebla ĉe la aŭtoro: Nyssens Instituto, 129, rue

Froissart, Bruxelles, Belgujo.

La Fabelo pri la ĝanda turo kaj la malĝanda doktoreto sekvata de aliaj konvinkigaj rakontetoj, de Henriko Fiŝer — Galatz, L. K., 24 paĝoj, prezo 10 sv. centimojn. Eldonejo de la Esperanto-Centro Rumana, Bucuresti, str. Dr. Istrate 10, Rumanujo. — La plejparto de la inhavo estas jam konata al la esper. mondo. La legadon tamen ofte ĝenas eraroj, kiel: tion sencon (tiun!), ili komencis disputi inter *ili* (si!), batalis inter *ili*, parolante inter *ili* (si!), *siaj* (liaj!) disĉiploj kunvenas, *sia* (lia!) pastraro, *sia* (lia!) moŝto rajdis sur *li* (ĝi! = azeno). Ankaŭ la interpunkcio ofte lamas.

Nivi (Grenkampoj), versaĵoj en bulgara lingvo de nia samideano Lalju Rogaĉev, Sofia, 1933, paĝoj 91, prezo 20 levojn; ĉe la aŭtoro: str. Carica Johanna, 1, Sofia. — Estas prikantata la vilaĝo, kiu lastatempe pli kaj pli fariĝas objekto de poeta kaj politika atento. Estus dezirinde vidi kelkajn el tiuj belaj versaĵoj en esperanto.

— Oni vendas tri volumojn de la libro „*Judischer Merkwürdikeiten*“ de Johan Jacob Schudt, eldonita en jaro 1717-1718 Informoj ĉe la BEAsocio.

„Радва ме, че моя работа ще излѣзе на езикъ, който се явява единъ отъ голѣмитѣ лостове за съграждане по-силни и по-здрави врѣзки между народитѣ, за да се достигне единъ день до бленуваното братство между племена и хора“.

Ас. Златаровъ

RICEVITAJ ESP. GAZETOJ

Brazila Esperantisto (Majo.Septembro)
 Esperantobladet norvega (Novembro).
 Espero katolika (Oktobro).
 Laborista esperantisto (Novembro).
 Ligilo (Novembro).
 Heroldo de esperanto (12. Nov.)
 Pola Esperantisto (Nov.)

Verda Mondo (Nov.).
 The British Esperantist (Dec.)
 Justice et Vérité (Nov.)
 Komunikoj de la Internacia
 laborista Federacio (Nov.)
 Italaj Informoj (Nov.)



КУРСЪ ПО ЕСПЕРАНТО

Членъ — Artikolo

Когато се говори за предметъ определенъ, отличенъ отъ другитѣ, за който вече е говорено или на който се иска да се укаже, въ Есперанто се поставя предъ съществителното члена *la*, еднакъвъ за всички родове, падежи и числа: *patro* баща, *la patro* бащата, *domo* домъ, *la domo* домътъ, *birdo* птица, *la birdo* птицата, *la patroj* бацитѣ. Ако предъ съществителното има прилагателно, то членътъ се поставя предъ прилагателното: *bona patro* добъръ баща, *la bona patro* добриятъ баща, *la nova domo* новиятъ домъ, *la blua birdo* синята птица. Неопределенъ членъ нѣма.

Упражнение 1. Tablo. La tablo. Pordo. La pordo. Letero. La letero. Homo. La homo. La homoj. La bela domo. La severa homo. Ruĝa lampo. La ruĝa lampo. Veraj fratoj. Bonaj patrinoj. La bonaj patrinoj. Libro. La libro. La verda libro. Unu interesa libro. Nova bastono.

La nova bastono. Granda teatro. Blanka ĉapelo. La blanka ĉapelo.

Съществително - Substantivo

Всички съществителни имена въ единствено число окончаватъ на *-o*; *patro* баща, *frato* братъ, *koĉo* пѣтель. Множествено число се образува чрезъ прибавянето на окончанието *-j*: *patroj* бащи, *fratoj* братя, *koĉoj* пѣтли.

За означаването на женски полъ на о ушевенитѣ съществителни служи наставка *-in*: *patro* баща *patrino* майка, *frato* братъ, *fratino* сестра, *koĉo* пѣтель, *kokino* кокошка.

Упражнение 2. *Frato* kaj *fratino*, *kuzo* kaj *kuzino*. *Paŭlo* estas *knabo* kaj *Paŭlino* estas *knabino*. *La leono* estas *besto*. *La rozo* estas *floro*. *La infanoj* estas en *la ĝardeno*. *Koko* kaj *kokino* estas *birdoj*. *La tempo* estas *mono*. *Sinjoro* kaj *sinjorino*. *Samideano*. *Samideanino*. *Samideanoj*. *Samideaninoj*. *Kongreso*. *La kongreso*. *Varna* estas *urbo*. *Nigra maro*. *La nigra maro*. *Ĉapelo*. *Ĉapeloj*. *Tago* kaj *nokto*.

Български Есперантски Съюзъ доставя:

Курсъ по Есперанто — Ат. Д. Атанасовъ — 7 издание	лв. 25
Учебникъ по Есперанто — Д-ръ Захари Захариевъ	" 55
Есперантски синтаксисъ — Д-ръ Захари Захариевъ	" 22
Практична граматика на Есперанто	" 3
Анекдотаро — Süsseg	" 10
Есперанто ще завладѣе свѣта — д-ръ Д. Гаврийски	" 12
Възможенъ и нуженъ ли е маждународенъ езикъ — д-въ Ив. Д. Шишмановъ	" 4
Конгресни речи на Заменхофъ 1, 2, 3 и 4—5 по	" 2
Портретъ на Заменхофъ 45 на 30 см.	" 10
Есперанто — д-ръ Ив. Д. Шишмановъ	" 2
Картички съ лика на Заменхофъ	" 1
Международна конференция за общъ търговски езикъ	" 5